

ENHAVO

AL KIU GRUPO VI APARTÉNAS? <i>Alexis Otero Castellón</i>	3-5
INVITO AL 14-a TUTMONDA FESTIVALO DE JUNULARO	6
KEA KOMITATKUNSIDOS EN GUANTÁNAMO	7
SURVOJE AL SAEST'97	7
SE VI PRETAS PRUVI VIAN VERK-KAPABLON... <i>La Redaktoro</i>	7
Tradukarto surbaze de personaj spertoj (I) <i>KELKAJ KONSIDEROJ</i> <i>Maritza Gutiérrez González</i>	8-9
Jen nia historio ANTAŬEN. MALGRAŬ ĈIO <i>Juan Ramón Rodríguez Gómez</i>	10-13
SANTO DOMINGO AKTIVAS <i>José Luis Montes de Oca Cárdenas</i>	14
HAVANO VOKAS <i>Maritza Gutiérrez González</i>	15
Aliĝilo por SAEST'97 <i>Alberto García Fumero</i>	16

Estimataj:

Kiel promesite pasintan numeron, ni akuis tiun ĉi. Finiĝas la jaro kaj novaj laborperspektivoj kaj planoj trapas niajn pordojn.

Jen tialga momento por analizi ĉu niaj isaj deziroj kaj revoj realiĝis. Ni deziras al vi ĉiuj multan feliĉon okaze de la nova jaro, sanon kaj sukcesojn senfinajn en via por E-agado. La rekomendo ĉi numera: analizi la ĉefartikolon (p. 3). Je la fino de la jaro, finiĝas ankaŭ la serio *Jen nia Historio*. Ĉu vi aldonos ion el via regiono? Adresu ĝin al via redaktoro.

Alexis



NACIA ESTRARO

*Julián Hernández Angulo
Prez., Atentas plenumon de
ĉiuj taskoj kaj fakoj.

*Maritza Gutiérrez González
Ĝenerala Sekr., Kontrolas
internan agadon.

*Alberto Rodríguez Pineda
Financoj, k. administrado
de la Centra Oficejo.

*Héctor Jiménez Batista
Instruado k. ILEI-Sekcio.

*Juan Ramón Rodríguez Gómez
Intern. kaj Pub. Rilatoj,
Historio kaj Libroservo.

*Pedro Fernández Rodríguez
Kulturo, Artaj kaj klerigaj
arangoj.

*Alexis Otero Castellón
Informado, Ĉefredaktoro de
Avanco, Noktuo k. Universo.

Komisiitoj

*Martha Alonso Gutiérrez
Kultura kunordigo.

*Juan Lázaro Bosada Toledo
Atento al verkistoj.

*Alberto García Pumaró
Scienco kaj tekniko.

*Miguel A. González Alfonso
Membroj subtenantoj.

VIII-a jaro, nro. 2 (3/96, sep.-dec.) / Aperas 3 foje jare / Eldonas Kuba E-Asocio / PF.: 5120; 10500 Havano, Kubo / Telefonnumeroj: 40-1364 k. 40-4484 / Fakso: 53 7 33 87 29 / Ĉefredaktoro: Alexis Otero Castellón / Grafika arango kaj kunredakto: Juan Ramón Rodríguez / Kunlaboris: José L. Montes de Oca, Maritza Gutiérrez, Alberto García, Roberto Molina kaj Alberto Rodríguez / Prezo: 1;00 CUP (enl.), 2.00 NLĜaŭ 2 irk. (eksterl.), pagendaj al KEA-konto ĉe UEA: ksaux-u / Ĉiuj rajtoj rezervitaj / Reproduktado permesata (indiki fonton k. sendi du ekzemplerojn al la Redakcio).

AL KIU GRUPO VI APARTENAS?

Alexis Otero Castellón

La lastajn tempojn, eblas konstati poiman malaltiĝon de la kvanto da esperantistoj venantaj al la aranĝoj. Tamen, antaŭ ol analizi la eblan aron da kialoj, provokantaj tian situacion, mi ŝatas klarigi ke mi ne celas vortumi serion da sensencaĵoj facilanime.

Niaj aranĝoj famas pro tio ke ni sukcesas krei unuon, el la kuba kaj E-a kulturoj. En la tipa aranĝo, la esperantisto uzas la lingvon pere de demandoj k. ludoj diversaj, legas kaj komentas novaĵojn, ktp.. Ĉarmo aparta estas ke la personoj dezirantaj esprimi sin pri la propra fako, aŭ pri iu alia temo, rajtas fari tion, t.e.; la perdoj ĉiam malfermas al novuloj. Tio alternas kun muziko produktata de esperantistoj mem. Poste venas la frandaĵoj kaj la balo, foje ĝis noktomezo. En kelkaj okazoj, ni ĝuas la ĉeeston de eksterlanda gasto, kio ankoraŭ venigas personojn tien ĉi.

Ni, aliflanke, konscias ke la situo de nia sidejo, disde la urbocentro, starigas la unuan eluzatan pravigon malĉeesti aranĝojn: transporto. Ĝin mi ne analizos ĉar suspektoplene kaj tre koincide, kiam estas eksterlandano, "aperas" ankaŭ aŭtobusoj...

Unuavice do, ni parolu pri informado. Oni opinias ke ĝi mankas, sed mi ne samopinias tiurilate. Ne kalkuleblan faskon da sciigoj pri E-o, ni sukcesas ŝovi en la programaron de plej diversaj radiostacioj. Radio Progreso, precipe, ties ĉiutaga programo Juventud 2000, anoncadas niajn sabatajn aranĝojn. Radio Reloj, Radio Ciudad de La Habana, Metropolitana, TAME, inter aliaj, jam faris same. Intertempe, la televido prezentis noticojn pri ni. Eble mi konsentus, se oni asertus, ke en gazetaro, de post la UK en 1990, aperas preskaŭ neniuj novaĵoj pri la movado. Kiel ĉefa prioritato por la kuronta jaro ni devus multon pli fari tiucele. Tamen, konsideru ke por la propraj informoj la ĵurnaloj malhavas spacon, imagu por la malpropraj. Malgraŭ tio, en la Centra Oficejo ni kalkulas je la servo de tri telefonoj, kaj tre ege malmultaj personoj uzas

ilin demandocele ĉu organizatas aranĝo aŭ ne.

Duavice, ĉar la slipoj de Membro-kontrolo neniel persvadis min pri diversaj aspektoj, mi esploris. Tiel, mi kontrolis pri la skribaĵoj sur la sliparon kaj aparte konstatis kaj konvinkigis pri aliaj trajtoj de niaj homfortoj. Kiam mi vidis la kvanton da membroj, kaj hodiaŭ partoprenas aranĝon kun malpli ol 20 personoj, mi trovas pravigon resumi tie ĉi la eltrovojn.

Eventuale, transporto kaj informado efikas kontraŭ la deziroj. Sed, se ni paralele analizas la konsiston de la anaro, kaj la interesojn de tiu anaro, oni povus alveni en tre interesajna konkludojn: mi trovis kvin malsimilajn grupojn.

La unuan, mi nomas *esperantistoj pro manĝokialoj*. Kiam en la lando ankoraŭ oni oficiale malpermesis al privatuloj vendi manĝaĵojn, kaj kion ofertis la ŝtato neniel satigis bezonojn, la anoj de tiu grupo nepre venis. De tiam, la Asocio ĝuis la rajton oferti nutraĵojn. Fakte, ilin allogis nur manĝo; kiam ĝi elĉerpiĝis, ili simple foriris, sen konsidere ĉu la aranĝo finiĝis aŭ ne. Nun, kiam la situacio estas pli bona kaj nutraĵoj aĉeteblas ĉie tra la urbo, mi neniam plu vidis eĉ unusolan el ili en KEA.

Jen vicas grupo *monhava*, granda malplimulto, preta aĉeti kion ajn ni ofertintu. En ĉi tiu aro listiĝas bieremuloj kaj karnavalemuloj. Hodiaŭ, kun elstare provizita merkato, paralele funkciaanta per USD, tiuj ja maltrovas allogon proksimiĝi: biero ekzemple, akireblas en la plej apuda stratangulo ĉe ilia hejmo. Ĉu el tiu grupo ni atendu partoprenon?

Nun venas la grupoj kiuj plej interesiĝas pri la afero Esperanto kaj vere agas por la movado. Ili estas *la kielvifartuloj* kaj *la elito*.

La unua el tiuj du grupoj, kiel la adjektivo indikas, temas pri personoj kun grandaj deziroj kontribui, sed kies lingva kapablo ne iras preter la frazo "Kiel vi fartas?" Ilin oni facile povas kalkuli inter la ĉiamaj partoprenantoj en la sabataj aranĝoj de la Centra Sidejo de KEA en Havano. Verŝajne, tiuj ja trovas la deziratan frandafon nome, aŭdas modelan paroladon, trovas sin inter la elito de la movado kaj, almenaŭ hispanlingve, klopodas helpi en tio plej proksima al la propraj personaj kapabloj.

Kion esprimi pri *la elito*?, la homoj kutime ŝarĝitaj je

laboro ĝis la ostoj. Ili, ĉiun duan sabaton, devas iri kaj kontribui al la sukcesa okazigo de la aranĝo. Opinions mi ke jam ili mem lacas kaj eble lacigas la ceterajn. Aliflanke, mi certas ke KEA ne celumas elitismon kiel politiko, sed kelkaj aferoj devas esti elitaj pro simpla kialo de pluekzisto. Kaj Esperanto ne restas for de la listo.

La lastan grupon mi nomas *fantomoj*. Tiuj aperas tiom subite, kiom poste same malaperas. Do, ili estas kaj ne estas. La hunteco de tiu grupo similas ĉielarkon. Lingva nivelo plej diversa, deziroj entrepreni agojn, projektojn mil ili havas, eĉ sukcesojn, sed ili malaperas kaj tre malfacilas trovi ilin en du aranĝojn sinsekve.

Alveno de novaj tempoj postulas aperon de novaj vizaĝoj. Kiel do venigi novajn vizaĝojn kaj poste restigi ilin ĉe ni? Kiel venigi ankoraŭfoje la iamajn personojn? Jen tiklaj demandoj... aŭ varmaj terpomoj, kiel pli intime ni esprimas inter kubanoj.

Jam plurfoje oni aliigis la metodon informi kaj venigi personojn: telefonaj kontaktoj, pordofrapado, telegramoj, aranĝi renkontiĝojn en lokoj pli proksimaj de la urbocentro kaj tiel plu; tamen, la rezultoj malfacilas. La strukturo de la festo ankaŭ ŝanĝiĝis kaj oni konstatis, dum du aŭ tri aktivecoj, certan nombroaltiĝon. Sed, post tio, la afero montriĝis sama, rilate partoprenon.

Oni konsciu ke tio, fakte, domagas la buĝeton. Ĉar kiam oni aranĝas ion atendente ĉeeston de almenaŭ kvardekon da personoj, kaj eĉ ne duono aperas (kalkulante la eble dekkapan eliton), la plej optimismaj elreviĝas.

Sed la Asocio restas tie jam dum pli ol dekkvin jaroj da agemo en ĉiuj flankoj. Almenaŭ mi, iama kielvifartulo kaj hodiaŭ plej eble parto konsistiga de la elito, pensas ke ĉiel ni devas daŭrigi antaŭen. La pioniroj transsaltis la plej obstinajn barojn... kial ne ni? *

Solvoproponon...? Mi lasas al vi tiun ŝancon, kaj ni partoprenigas vin de la debato, tiel ke vi ne partoprenu pasive, do konsumisme: jam mi avertis en la komenco ke la afero estus pripensiga kaj ĉifoje vi ne nur konsumu -MI INSTIGAS-, sed ankaŭ kontribuu.

Do, mi turnas la parolvicon...

INVITO AL 14-a TUTMONDA FESTIVALO DE JUNULARO

Geamikoj:

Kiel sciate, de antaŭ pluraj jaroj, en la mondo ne okazas Tutmondaj Festivaloj de la Junularo kaj la Studentoj, kio konsistigas taŭgan forumon por diskuto de la bezonoj, sopiroj kaj aspiroj de la junula opo. Ĝi ankaŭ rolas senperan renkontiĝejon por spertointerŝanĝo inter la diverslandaj partoprenantoj, kie ĉiuj, malgraŭ la lingva diverseco, elŝprucas ideojn, proponojn kaj fontigas agadplanojn plurcelajn.

Konsidere al malĉeesto de tiaspeca aranĝo, la kuba registaro, voĉe de la enlandaj junuloj petintaj tion, decidis alvoki la internacian junularon festi la 14-an Tutmondan Festivalon de la Junularo kaj la Studentoj en la kuba ĉefurbo. La evento okazos inter la 28-a de julio k. la 5-a de aŭgusto 1997. La dato estas tre konvena ĉar ne interferas partoprenon en la UK de Adelajdo (julio 19-26/97), nek en la 53-a IJK de Italio (aŭgusto 24-31/97).

Certe, kiel dum la 11-a Festivalo de 1978, ankaŭ okazinta en Havano, oni aranĝos renkontiĝojn, krom la kutime enkadra programo, ĉar strategie ni celas engaĝiĝi en la Organizan Komitaton. Kuba E-Asocio invitas la junajn geesperantistojn de la tuta mondo veni al Kubo festivalumi, renkonti samideanojn, revigligi amikiĝojn, loĝi en la hejmo de unu el ni, kaj ĝui nemalhaveblan ŝancon konstati propraokule la realon pri la situacio de tiu ĉi eta insulo.

Ni esperas ne tro peti: se vi povas, bv. diskonigu la enhavon de tiu ĉi letero, emfazante ke la kuba esperantistaro sopiras je pli vigla kaj senpera kontakto kun esperantistoj de la tuta planedo.

Kun plej koraj salutoj, samideane via,

Kuba Esperanto-Asocio

KEA KOMITATKUNSIDOS EN GUANTÁNAMO

Kiel ĉiujare, januaro estas por Kuba Esperanto-Asocio etapo de intensa laboro. Kial? La preparlaboroj rilataj al la Komitatkunsido de KEA. Tiucele, la NE, reprezentantoj el ĉiuj filioj k. invititoj, kunsidos en Guantánamo la proksiman monaton, de la 23-a ĝis la 25-a. Ĉar tiu momento tuj venos, ni streĉigas la fortojn: pretigo de informoj, bilanco de la laboro dum 1996, proponoj de ĉefaj taskoj por 1997, preparakondiĉoj surlokaj (certigo de loĝigo, revenbiletoj, lastaj precizigoj, ...), antaŭvido de stimuloj por plej laboremaj filioj k. aktivuloj...

SURVOJE AL SAEST'97

La Scienoteknika Sekcio (STS) de KEA informas ke jam alproksimiĝas la lasta limdato por akcepto de resumoj de la prelegoj prezentotaj en SAEST'97: t. e., maksimume, 30an de januaro. Ni memorigas ke tiu evento okazos la proksiman jaron, dum tri tagoj, en la Muzeo pri sciencoj Carlos J. Finlay, en la ĉefurbo. Inter la temoj: Apliko de E-o en ĉiuj sciencaj branĉoj, Spertoj kaj esploroj rilate al denaska dulingveco, E-o en medicino kaj medicino en E-o, kaj aliaj. La interesitoj devas plenigi kuponon (vidi paĝon 16 de tiu ĉi gazeto) kaj sendi ĝin al Havano. La tutan prelegon vi adresu al KEA antaŭ la 30a de marto 97. SAEST sesios per prelegoj, rondtablaĵ kunsidoj kaj afiŝoj. Aliĝkotizo kostas 20 pesojn nacivalute. Eksterlandanoj ankaŭ bonvenas.

SE VI PRETAS PRUVI VIAN VERK-KAPABLON...

La E-grupo de Andalucio alvokas Konkurson pri rakontoj en la lingvo de Zamenhof, sed atentu: limdato estas la 31an de marto/97, konkursaĵoj estos ne pli ol ses paĝaj je du tajpospacoj kaj konkursoj devas uzi pseŭdonimon. La rezultojn oni diskonigos en junio. Premio: 10 000 hispanaj pesetoj al la unua loko. Adreso: J. F. Martín, Caja Postal 5184, ES-29080, Málaga.

KELKAJ KONSIDEROJ

Maritza Gutiérrez González

Generale en nia komunumo, la esperantistoj konsideras sian unuan prioritaton disvastigi kaj instrui la lingvon, kio kompreneble estas ĉefaj taskoj en la komuna celo diskonigi la lingvon kaj la progresojn sur la diversaj agadkampoj.

Tamen, neniu devas preteratenti ke unu el tiuj kampoj pri kiuj oni kutime disvastigas informojn estas la kultura fono kaj la kultura kreo ekzistanta pere de la lingvo. Do, estas nepre necese ke kelkaj homoj dediĉu sin al tiu alia tasko kiu estas nedisigbla de la organiza agado kiel kulturo, arto kaj literaturo esence.

Unu el la formoj krei kaj rekrei la lingvon estas sendube la tradukado, kiu estis unu el la prioritatoj de la kreinto de Esperanto, ĉar li saĝe komprenis ke lingvo sen kultura kreaĵo jen originale jen tradukita, ne povas multe progresi.

En nia lando kiel ĉie ajn, estas grupo de esperantistoj kiuj multe interesiĝas kaj ofte eksperimentas en la traduka agado kun la ĉefa kaj esenca celo diskonigi la nacian kulturon pere de Eo.

Dum multaj jaroj, ankaŭ mi okupiĝis pri tio ĉi kaj specife en la tradukado de poemoj kaj kanzonoj, kvankam pro laboraj postuloj mi devas ĉiusemajne traduki centojn da linioj nek poeziaj nek muzikaj, sed nura prozo.

Do, mi havis la ŝancon alfronti diversajn tekstojn en traduklaboroj kio sendube ekzercigas min en la fako. Tiamaniere estiĝis la ideo transdoni kelkajn konsiderojn al tiuj kiuj aspiras fariĝi tradukantoj kun certa digno.

Unue, mi rekomendas atentan legadon de la tradukota teksto kaj certigi pri korekta kompreno de la originalaĵo. Kompreneble, kiam vi decidis alfronti tradukan laboron, estas klare ke vi jam posedas sufiĉan lingvan nivelon kun kelkjara lernado de la lingvo kaj legokapablon, kiu ebligas al vi tuj kapti la sencon de kiu ajn teksto. Alimaniere ne eblus vere traduki ion ajn dece. Des pli se oni interesiĝas pri versa tradukado.

Kiel traduki versojn?

Nu, temas ja pri alia afero por kiu ne ekzistas recepto unika! Traduko estas arto, kiu postulas ian talenton kaj pro tio indas je memanalizo de personaj kapabloj paralele al studado.

Bona tradukanto de poezio klopodas transdoni ne nur la nudan sencon: la ekstrakton de la originalo, sed ankaŭ ties nuancojn kaj riĉecon en la esprimoj. Esenca principo de literatura traduko estas do, esprimi ion, ne iel ajn, sed esprimi ion perfekte, elvokive, adekvate al la sento. Komprenible, atingi tion ne ĉiam estas plensukcesa strebo de la tradukanto. Eĉ elstaraj tradukantoj ne ĉiam perfekte tradukas: tamen, ĝi estas principo sekvenda kaj rekomendinda al ĉiu homo kiu celas traduki literaturajn versojn.

Elstaraj literaturistoj esprimas la jenon pri versa tradukado:

a) Ĝi estas arto de kompromisoj, ĉar la tradukanto devas serĉi ekvilibron inter la formo, la enhava fideleco kaj la arta efekto.

b) La tradukanto devas esti kuraĝa por serĉi pacience tiun menciitan ekvilibron.

Tre ofte, tiuj tri postuloj kolizias: kelkfoje la formo prezentiĝas kiel malvasta kadro kiu malhelpas transdoni la enhavon de la originalo; kaj foje la intenco fidele transdoni la enhavon malhelpas la uzon de pli-bela sona efekto.


Do, la tradukanto devas nepre trovi ekvilibron kaj, kelkfoje, kontraŭ memvolo, devas oferi unu el tiuj postuloj favore al la alia. Oni ne povas forgesi ke poemo —ĝuste, ĉar estas poemo kaj ne prozo— esprimas ne nur ian senton aŭ ideon, sed esprimas ĝin per specialaj rimedoj. Ne ĉiam la plej simpla parolmaniero estas la plej efika. Pro tio ja okazas ke multfoje la plej fidela poema traduko estas samtempe la plej malfidela, ĉar ĝi povas perfekte prezenti la skeleton de la originalo, sed ne ties vivantan karnon. Ĝuste tial bezonatas la ekvilibro, eĉ se foje la tradukanto restas ne kontenta pri la fina rezulto. Do, devizo de tradukanto devas esti nekontentigo, ĉar nur penante al perfektigo de la tradukata verko, ĉiam per elprovoj de diversaj formoj kaj eldiroj, oni pliriĉigas kaj senkonscie evoluigas la lingvon.

El *Simplaj Versoj*, de J. Martí.

Eliri de l' mond' mi volas
tra luma natura pord'
en ĉaro verdofolia
ĝis portu oni min al mort'

Ne lasu min en mallumo
kiel perfidulo ĝis mort'
bonul' mi estas kaj tia
front' al suno venos mort'

Jen nia



Historio

En la lasta eldono (aŭgusto/96, aperinta fine de novembro), *Avanco* daŭrigis kun la Unua skizo pri la Historio de la E-movado en Kubo. Tie aperis la Sepa periodo (1979-1990), sub la titolo "Sukcesoplena epoko". En tiu ĉi okazo, ni finas la publikigon de tiu materialo. Tio inkluzivas la Okan periodon (1991 ĝis la nuntempo).

ANTAŬEN, MALGRAŬ ĈIO

Juan Ramón Rodríguez Gómez

La laboro de KEA en la nuntempa periodo ekkomencas per la realigo de la jarkunsido de la Nacia Komitato, kie, inter aliaj aferoj, oni analizas la agadon de la Asocio dum 1990, aprobas la buĝeton por 1991 kaj la laborstrategion por la jaroj 1991-1993, kaj elektas novan Nacian Estraron.

Laŭ la voĉdono de la komitatanoj, la NE rezultas tiel: Julián Hernández Angulo (Prezidanto), Alberto Fernández-Calienes Barrios (Vicprezidanto), Roberto Torres Alvarez (Organizo), Alberto Gabriel Rodríguez Pineda (Financoj), Orlando Raola González (Internaciaj kaj Publikaj Rilatoj), Martín Castro López (Kulturo), Juan Ramón Rodríguez Gómez (Propagando kaj Informado, krom Historio), Héctor Jiménez Batista (Edukado), kaj du anstataŭantoj: Alexis Otero Castellón kaj Jorge Toledo Pérez.

En junio 91 efektiviĝas, ege sukcesa, la II-a Kuba E-Festivalo (Santo Domingo, Villa Clara), kie ĉeestis 387 geesperantistoj, el 11 provincoj, malgraŭ la malfacilaĵoj propraj de la Speciala Periodo. Dum tri tagoj, tiu urbeto estis la ĉefurbo de la esperanta etoso en la lando. (La I-a Kuba Esperanta Festivalo okazis meze de junio 1989 en Santa Clara, Villa Clara.)

Pro la sukcesa realigo de la 75-a UK kaj la graveco de nia laboro, Kuba E-Asocio ricevas novan lokon por la Nacia Sidejo (Vista Alegre # 264, inter Juan Bruno Zayas kaj Luz Caballero, en kvartalo Vibora, municipo 10 de Octubre), kien la NE

transloĝiĝas la 17an de julio 1991.

La ceteraj monatoj de tiu jaro, krom la tutlanda agado, estas dediĉata de la Nacia Estraro al la riparado de sia sidejo por ekkomenci ampleksan programon de aranĝoj en la sekvanta jaro.

Januare '92, sukcese efektiviĝas la jara kunsido de la Nacia Komitato, en Bayamo, kie oni faras grandan laboron, kiel la analizon de okazintaĵoj/1991 k. la planojn por 1992, k. la diskutojn por la novaj Statutoj de la Asocio. Tie, oni elektas urbon Santiago de Cuba kiel sidejon de la Komitatkunsido '93.

En februaro (inter la 4-a kaj la 10-a), KEA partoprenas en la Internacia Librofoiro Havano '92, kun stando; kaj, en aprilo, ĝi ĉeestas en Expolingua Havano '92, ankaŭ kun stando, k. prezentas kelkajn prelegojn kadre de speciala simpozio pri E-o. Prelegas: Julián Hernández Angulo, Alexis Otero Castellón, Héctor Jiménez Batista, Orlando Raola González, Maritza Gutiérrez González, Juan R. Rodríguez Gómez kaj Juan Lázaro Besada.

La tutan jaron, la Nacia Sidejo okazigas aranĝojn dufoje monate (ne laboraj sabatoj), kun amaso da partoprenantoj; ankaŭ du foje monate okazas junularaj renkontiĝoj en alternaj vendredoj. Mezjunie, oni faras la I-an Nacian Seminarion kun aktivuloj de la lando; kelkaj estraranoj prelegas tie.

Fine de 1992, KEA ekkomencas ricevi eksterlandajn gastojn kaj lui siajn ĉambrojn por plimultiigi la enspezojn, ĉefe devizoj; krome, en decembro, vizitas la landon gesinjoroj Blanke, kiuj prelegas por la esperantistaro en Urbo Havano kaj Santiago de Cuba, sed ankaŭ al fakuloj kaj studentoj en la Havana kaj Orienta Universitatoj.

La komitatanoj kunsidantaj en Santiago de Cuba, 30-an kaj 31-an de januaro 1993, analizas la agadon dum 1992, aprobas la buĝeton por la nova jaro, kaj, i.a. gravaj aferoj, elektas novan NE-n, laŭ la ankaŭ novaj Statutoj.

Post la voĉdono, la NE restas tiel: Julián Hernández (prez.), Alberto Fernández-Calienes (ĝen. sekr.), Alberto G. Rodríguez (kasisto), Maritza Gutiérrez (int. kaj publ. rilatoj, propa-

gando kaj informado), Alexis Otero (instruado), Orlando Raola (utiligo de E-o) kaj Martín Castro (kulturo). Poste, la NE elektis kvar komisiitojn por atenti specifajn fakojn: Pedro Fernández (Perkoresponda kurso), Roberto Torres (Membro-kontrolo), Héctor Jiménez (Instruado) kaj Juan Ramón Rodríguez (Historio).

En aprilo, KEA ĉeestas per stando en Expolingua '93 kaj tie oni prezentas kelkajn prelegojn k. afiŝojn, k. oni interrilatiĝas kun diversaj institucioj k. centroj rilataj al tradukado, eldonado kaj instruado de lingvoj.

Meze de la jaro, okazas la II-a Nacia Seminario por aktivuloj de provincoj. Samtempe, kaj iom poste, kelkaj estraranoj de KEA vojaĝas eksterlanden pere de diversaj rimedoj. Du el ili pagitaj de la grupo KUUK (Kubanoj al UK-oj), fondita en Londono tiucele, en februaro 1993, laŭ ideo de Georgina Almanza (elstarkuba aktorino) proponita en Havano al Ann Johnson en januaro tiujare.

Kaj, se temas pri la jaroj 94-95, celante ne tro vortumi pri la sukcesplena asocia antaŭeniĝo, malgraŭ ĉio, rimarkindas listigi la plej pinte gravajn okazintaĵojn:

-Januaraj jaraj Komitatkunsidoj 1994'95, en Sancti Spiritus kaj Camagüey, respektive;

-Stando en Internacia Librofoiro Havano '94;

-Prelegoj kaj standoj en Expolingua '94 kaj '95;

-IIIa Nacia Seminario por Instruantoj (1994);

-Nacia Seminario por Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (SAEST'95) kun 29 referaĵoj diverstemaj;

-Naciaj renkontiĝoj en la opaj provincaj filioj omaĝe la 15-an datrevenon de KEA;

-Aktiva partopreno de dukapaj kubaj delegacioj al UK-oj en Seŭlo kaj Tampere (parte dank' al edifa helpemo de Ana Montesinos de Gomis, kiu alprenis la ĉefajn respondecojn kadre de KUUK);

-Kvar regionaj renkontiĝoj en 1995: Pinar del Río (marto), Holguín (junio), Ciego de Avila (septembro) kaj Guantánamo (decembro);

-Centraj aranĝoj en la Nacia Sidejo de KEA okaze de la 16-a datreveno de la Asocio, meze de junio, kaj de la naskiĝtago de Zamenhof.

La nova jaro (1996) startas ege aktiva: stando en Librofoiro Havano'96 (februaro 5a-13-a), partopreno en la III-a Amerika Kongreso en Kostariko (februaro 12a-17a), jara Komitatkunsido (Havano, 5a-6a de marto), II-a Nacia Kongreso de KEA (marto 6a-9a), Expolingua'96 (aprile), V-a Nacia Seminario por Instruantoj (junio),...

Do, nacie kaj internacie, nia bildo kreskas kaj antaŭvidas viglan vivon de Esperanto, ne nur ekde movada vidpunkto. Fakte, malgraŭ la nuntempaj malfacilaĵoj, ni kreskas, progresas, marŝas, saltas, avancis, ... kaj atingas plenaĝecon.

BIBLIOGRAFIO

- Fernández-Calienes, Alberto: Notoj pri historio de la Esperanto movado en Kubo (1904-1983). Havano, 1983, ne eldonita.
- García-Carranza, Araceli: Bio-bibliografía de Don Fernando Ortiz. La Habana, 1970.
- Johns, Elias: El problema de una lengua auxiliar internacional y su solución: el Esperanto. Havano, Havana Universitato, 1928.
- Juárez Figueredo, Héctor: "Esperanto y filatelia", en Filatelia cubana, jaro XV, n-ro. 1, januaro-aprilo 1980, pp. 16-19.
- Kolekto de Avanco.
- Kolekto de Cuba esperantista.
- Kolekto de Latinamerika esperantista.
- Persona arkivo de la aŭtoro.
- Persona arkivo de Pedro P. Lamas Díaz.
- Pírez, Basilio E.: "El Esperanto en Cuba", en Bohemia, la 10an de oktobro 1910, pp. 250-251.
- Rodríguez Gómez, Juan Ramón: Kolekto de artikoloj publikigitaj en el habanero, la 2an, 3an, 4an, 5an kaj 7an de aŭgusto 1990.
- Sciigoj senditaj de Raúl Juárez Sedefio al la aŭtoro.

(Jen, la fino de tiu ĉi serio dediĉita al la Unua skizo pri la Historio de la E-movado en Kubo. Unu plian fojon, ni invitas vin elverŝi opiniojn pri la temo. Se vi deziras la tutan skizon, mendu ĝin al Libroservo de KEA kontraŭ 3 pesoĵ aŭ 3 USD. Tiu teksto aperis kiel broŝuro, sub la titolo *La Esperanto-movado en Kubo*, okaze de la II-a Nacia Kongreso de KEA, en marto 1996).

SANTO DOMINGO AKTIVAS

José Luis Montes de Oca

La Municipala Filio (MF) de KEA en Santo Domingo (Villa Clara) donacis medikamentojn al akuŝejo de tiu vilaĝo. La donaco estis farita la 3an de oktobro, kadre de aranĝo en la hospitala administrejo. Ĉeestis lokaj e-istoj, la administra stabo de la hospitalo kaj pacientoj, kiuj dankis pro la donaco. La medikamentojn sendis al Santo Domingo la E-grupo de Ĉeŝte, Hispanio.

Aldoniĝas tiel plia ŝtupo en la konstanta agado de tiu MF, kiu daŭre kaj tre ege stabile laboras. Ekzemplo pri tio estas ke, du semajnojn antaŭe, ili akceptis la viziton de S-ino Elda Doerfler k. Giuseppe Vale, e-istoj de Triesto (Italio). Kiuj restis du tagojn en la vilaĝo, kie aktivadis: aranĝo kun e-geknaboj kaj plenkreskuloj, kunsido kun la estraro de la filio, lecionoj pri gramatiko... La vizito, kuraĝiginta la lokajn movadanojn, estis taksita de s-ino Elda kiel sukcesa k. ĉarma. La italojn multe impresis la kapablo de kelkaj el la knaboj mezlernejaj, kiuj regas E-on bonege.

La lingva, labora kaj organiza niveloj de la lokaj e-istoj ebligis helpi k. kontribui al la movada evoluo en aliaj teritorioj. T. e. la kazo de Morón, en la najbara provinco Ciego de Avila, kie de antaŭ kelka tempo ili kreis malgrandan grupon, kiu ricevis lecionojn ĉiun duan semajnon. Post la tempopaso, ankaŭ tie burĝonis la semo de E-o kaj oni organizis Municipalan Grupon (MG), aranĝon kiun gvidis José Luis Montes de Oca, Prezidanto de la MF Santo Domingo kaj profesoroj de la menciita grupo. En Morón, la estraro de la MG estas jena: Carlos Cardoso (prezidanto), Yoel Romo (ĝenerala sekretario) kaj Reidy Sierra (kasisto). Al ili koncernas nun porti la torĉon kaj daŭrigi la laboron komencitan. Jam ili malfermis novan E-kurson (15 personoj), kaj ricevis la viziton de Doerfler kaj Vale (*), pere de aranĝo en la loka biblioteko.

(* La redaktorino de La Eta Gazeto kaj S-ro Vale vizitis Kubon kaj, dum 15 tagoj, vojaĝis tra la tuta insulo. Ili prelegis, instruis kaj renkontiĝis en preskaŭ ĉiu kuba provinco. Ili krome oferis du intervjuojn al Radio Havano-Kubo. (N. R.)

Havano vokas

HORO UTC	M	KHZ	REGIONO
7.00	31	9820	Okcidenta, Norda Ameriko kaj Pacifika Azio
15.00	25	11760	Tuta Ameriko kaj Karibio
19.30	21	13715	Eŭropo kaj Mediteraneo
22.00	21	13715	Eŭropo kaj Mediteraneo
23.30	25	11760	Tuta Ameriko kaj Karibio
	25	11875	
	49	6070	

Dum la nuna jaro, la E-redakcio daŭre disaŭdigis sian duonhoran programon kun variaj informoj pri Kubo, pri la movado kaj korespondinformoj diversaj. Ni pli sentis ke oni aŭdas nin ĉi kontinente kaj ankaŭ en Eŭropo.

Menciindas ke por ni tre bone efikis la aktivado de AERA, kies respondeculo, B. Masala, per sia entuziasmo kaj vigleco certe kontribuis al nia laboro. Tion ni konstatis per la ofta raportado de nia amikaro kaj la konstanta kontribuo de pluraj esperantistoj kaj organizaĵoj tra la mondo.

Al niaj samlandanoj, ni petas plian korespondadon kaj insistemon. Ni plezure bonvenigas ĉies korespondaĵojn.

Maritza Gutiérrez González
RIK-Redaktorino

Seminario pri Apliko de E-o en Scienco kaj Tekniko

ALIGILO

Familiaj nomoj _____

Persona(j) nomo(j) _____

Profesio/Fako _____

Privata adreso _____

Telefonnumero _____

Fakso/Retpoŝto _____

Mi partoprenos per _____
Prelego Aŭdo Ĉeesto

Titolo _____

Aŭtoro(j) _____

Mi bezonas Projekciilon por lumbildoj (dispozitivoj)
 Sonregistrilon
 Retroprojekciilon
 Alispecajn (Bv. klarigi)

Resendi tuj al:
Alberto Garcia Fumero. Sciencteknika Sekcio.
Poŝtkasto 5120, CU-10500, Havano, Kubo.